AVENO # 44 - AGADO de AVE kaj de AVEanoj - 2018

Jen gheneralaj informoj pri AVE kaj aliaj CSO-oj kaj
diversaj peticio-petoj, aliaj trovighas je Ekologio & Homaj Rajtoj

La kotizo por AVE estas libervole paginda - proponite: 5 EUR jare, pli au malpli eblas.

Nia UEA-Konto: avex-z; Konto de UEA: IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGBNL2A
Noto: (de "via nomo" por Kto. avex-z)

Elkoran dankon – Manfred Westermayer, la sekretario.
Adreso: AVE, Kandelstr. 62, 79194 Gundelfingen/Breisgau, Germanio
Retejo de AVE: http://www.verduloj.org
Nia interreta diskutejo trovighas je Ipernity, tie serchu la grupon "Verduloj"

Koncize:
1984 - 2014 AVE kunvenis por festi la 30-jarighon:

Ni tradukis la Manifestojn 2014 de la Europaj Verdaj Partioj (trovebla sur www.verduloj.org)
- Federacio de Junaj Europaj Verduloj
- Europa Verda Partio: europeangreens.org
- tutmonda asocio de verdaj partioj: GlobalGreens.org

La projekto http://www.lingvo.info celas provizi informojn pri lingvoj kaj diskonigi plurlingvecon en la interreto … La retejo estos havebla en almenaŭ 17 lingvoj ekde sia lanĉo.

Internaciaj Ago-Tagoj (nur kelkaj)
01-27 : Rememortago pri la kruelajhoj de la fashismo (liberigo de la koncentro-lagero Auschwitz)
02-21 : Internacia Tago de la Patrina Lingvo
03-08 : Internacia Tago por Virinoj
03-10 : Internacia Tago por la Autonomio de Tibeto
03-21 : Tago de la Mondcivitanoj
03-22 : Internacia Tago por la Akvo
04-20 : Tago de la Tero
05-09 : Europa-Tago
05-15 : Nakba-memortago pri la forpelado de araboj el la nov-fondita shtato Israelo (1948)
05-21 : Internacia Tago por la Kultura Evoluo
06-08 : Tago de la Maroj
06-11 : Internacia Tago de la Lingvoj
….
=== Detale lau la dato ====
(kutime mi uzis la literumadon ch … u )
= =

2018-11-16 Esperanto-Centro Rumonge (Burundo) - aktuale
Dank' al kelkaj donacoj eblis renovigi la Eo-Centron.
Nun ANEB proponis aktivigi ghin kaj mem enspezi monon per infanghardeno.
Sed, unue necesas acheti apudan terenon por daure havi la aliron al la strato…
Ni klopodas ricevi subtenon, sed ni devus mem kontribui, do donacoj bonvenas;
bonvole al la UEA-Konto de „Esperanto en Evoluo“ eeer-u, rimarko: „Rumonge“
= =

2018-11-06  samideanaj gestudentoj bezonas subtenon  (SBV – bonvolo.net )
Societo Bonvolo en Goma (DR Kongo) (asocio de esperantistoj) helpas al multaj infanoj kaj junloj:
- junaj virinoj lernas kudri, kaj vendas ornamajhojn kudritajn de ili.
- krome estas pluraj ge-studentoj kiuj bezonas subtenon por al-pagi la stud-kostojn (inter 280 – 500 USD jare); chiuj parolas Esperanton, kaj kelkaj jam instruas Esperanton (ekz-e Sarah kaj Nikson).
Alphonse zorgas surloke kaj Penny Vos (Australio) subtenas kaj organizas la retejon.
Ilia retejo – bonvolo.net – estas en Esperanto, la angla kaj la franca;
tie vi trovos diversajn pag-manierojn.
Se tiuj ne taugas por via ebleco – vi povas donaci al la UEA-konto de AVE: avex-z
Bonvolu noti „Goma-studentoj“

==

2018-08-28  per-Esperanto-Agado de AVE 2017 – 2019:  verduloj.org

Tanzanio – Mramba Simba:
- gastigejo por 24 lernantinoj de Esperanto Secondary School en Marambeka, espereble la komunumo trovos la mankantan monon por meblaro kaj pordoj;
- Pluvakvo baseno funkcias, por brut-bestoj kaj ghardenoj;
- ni (Esperanto Freiburg kun aliaj) subtenas 20 georfojn per pago de lernokostoj;
- 2019: rearbarigo de monto Tirin'gati, ni provas peti Ecosia.org subteni ghin.

D.R. Kongo:
Uvira – Martin Fadhili:
montara rearbarigo kaj subteno de 2 lernejanoj

Goma – Alphonse (SBV – bonvolo.net ):
subteno de 3 studentinoj por finstudi – la projekto Psiko-sociala helpo estis diskutita, sed eble tro granda por SBV.
2019: daura subteno de Jakvo Salama kiu studas ankorau dum 2 jaroj informatikon.

Kalima – Etienne Katchelewa:
- Akvo por Kalima, 10 kranaroj en pluraj kvartaloj (ekde 2013 por ch. 15.000 homoj);
por 2019:
Granda projekto estas konstrui akvo-prenilon je montorivereto kaj konduki la akvon al la urbo (por ghis 60.000 homoj).
AVE devus kolekti 3.300 Euro por atingi kune kun subteno de Cents-for-Help (9.500 Euro dank' al kunlaborantoj de firmao Robert Bosch) 25.000 de germana shtata fonduso por malgrandaj projektoj.
Mi petas vin subteni tiun grandan projekton,
chu al nia UEA-konto: avex-z
chu al konto de germana asocio (Verein Direkthilfe für Kleinprojekte Freiburg e.V.)
ilia konto che Volksbank Freiburg (Germanio) : IBAN: DE58 6809 0000 0009 4430 02
BIC: GENODE61FR1 – ekde via donaco de 100 Euro vi ricevos kvitancon (valida por EU-financoficejoj) – teorie eblas, ni jhus kontrolas chu tio fakte funkcias.
- -

2018-08-28  AVE-kunsido okaze de la UK en Lisbono – aktualigita
En salono Nguyen (32 sidlokoj) partoprenis entute ch. 40 homoj.

Ursula prezentis la aktualan staton de AVE kaj la per-Esperanto-Agadon.
Ni ja serchis novan sekretarion; sed tiu ne montrighis, do, mi – Manfred – restos provizore ghis la UK en Lahti.

Tamen granda helpo estas ke
Georges Sossois komunikadas kun la europaj Verdaj Partioj – li raportis pri tio, ekz-e en Majo AVE prezentis Esperanton dum Verd-partia Konsilio en Antverpeno (koran dankon al Georges, subtenita de Ronald kaj de lokaj esperantistoj :)
Claude Rouget pretas fari la retejon – grandan dankon :)

Aliaj aktivuloj pri ekologiaj temoj:
Renee Triolle serchas kapablan preleganton pri ekologiaj temoj por UNESKO.

Elizabeth montris infanan bildlibron pri Wangari Maathai en la franca, kion shia grupo tradukis en Esperanton – kaj nun serchas eldonejon. W. M. Batalis por demokratio en Kenio kaj kun multaj virinoj replantis i.a. praarbaron kiun bruligis la brita armeo dum kontrau-kolonia batalo (por pli facile mortigi la ribelulojn).

Pablo Conesa propagandas agadon "unuinfanounuarbo.org", celas instigi UNESKON ktp. Subteni la arboplantadon. Se vi vizitas tiun retejon vi trovos "ecosia.org" – en 7 lingvoj.
Ecosia estas ret-serchilo kiu uzas ch. 50% de la enspezata mono por arboplantado-projektoj; kaj krome preventas ke vi daure ricevas mesaghojn post serchado lau iu temo.

Kelkaj prov-alighis al AVE – koran bonvenon.
Bedaurinde multaj, aparte la malfruuloj, ne enlistighis, sed ili eble poste sendos mesaghon.

Koran dankon al chiuj partoprenantoj
kaj al Ursula por la organiza laboro – ankau por prezenti AVEon je Movada Foiro - kaj al Julia kiu komputile sukcesis savi la prezentadon :)

Komento AVE/mw:
mi aldonis kio rilatas al AVE kaj koncizigis - koran dankon al chiuj aktivaj partoprenintoj.

 = =
2018-06-22  Esperanto Agado pera kaj ankau pora

Nia aktuala per-Esperanto-Agado celas plifortigi la projekton Akvo por Kalima (Etienne), tiel ke la estontaj enspezoj sufichos por la bezonata memstara dauripovo.
Ni ankorau atendas la jes-on de du firmaaj fondusoj, tiam prezentos projekton de 38 mil Euro al shtata fonduso.
Tiu granda projekto kondichas ke ni esperantistoj kolektu 10% de chi-tiu sumo, ghis 4 mil.

Pri la projekto Psiko-socia helpo ni ankorau atendas la konkretigon; kaj deziras sukceson por la studo-fino de Lucie kaj Doriane.

Mazingira, Tanzanio (Mramba Simba) – gastigejo por lernantinoj - nun ricevas subtenon de aliaj kaj esperebIe povas cherpi el la produktado de suflora oleo.

Marghene niaflanke estis la per-Esperanto-Agado:
Nun ni volas subteni la samideanojn en Rumonge (Esperanto en Evoluo, Johan Derks krome Hasan, Patric kaj aliaj gesamideanoj en Burundo). Ghis 2014 ili sukcesis konstrui domon en Rumonge, kelkajn 100m de la Tanganjika Lago, ili alkolektis Esperanto-bibliotekon kaj okazigis instruoj. Pro la familiaj evoluoj de la aktivuloj la aktiveco lamighis, kaj nun alvenis la intereso flanke de ANEB revigligi la Esperanto-Centron.

Ili komence stabiligos kaj kalfatros la tegmenton kaj krome faros la bazajn renovigajn laborojn; ili bezonas 500 Euro por la materialo.
La domo kun iom granda tereno ighos posedajho de ANEB, kaj mi prezentos evoluo-projekton (ch. 6 mil Euro, iom multe char necesas al-acheti terenon por havi aliron al la strato) al fonduso en mia germana-federacia lando Baden-Virtembergo; char ghi partneras delonge kun Burundo. Ni ankau esperas ke iam la politika situacio normalighos.
La projekto celas dauran enspezon uzante parton de la konstruajho kaj eble la chirkauan terenon.
Do:
Se vi povas subteni almenau unu el tiu 2 projektoj ni petas ghis Septembro vian transpagon al la sekvaj UEA-kontoj:
avex-z  (ghis Oktobro)  subteni Akvon por Kalima
eeer-u  (tuj – antau la pluv-sezono) subteni la revigligon de la Esperanto-Centro Rumonge

Konto de UEA:
IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64
BIC/SWIFT: INGBNL2A

"de "via nomo" por Kto. avex-z"
anticipan dankon, amike, Manfred
 = =

2018-05-19  Konsilio de la Europaj Verdaj Partioj en Antverpeno & Esperanto
AVE partoprenos tiun konsilion montrante Esperanton per informstando, dank' al Georges Sossois kaj Ronaldo Nobel, kaj eble kunlaboranto el la Antverpenaj Esperantistoj.
La konsilio okazos en la Elzenveld-Seminariejo, jen la retejo:
https://europeangreens.eu/antwerp2018

Eble indas rememori pri kuna agado de Esperanto & Verdaj Partioj ek de 1984:
http://www.verduloj.org/welcome.htm#Verdul_Esper

raporto sur: a44_verd.pdf
 ---

2018-03-31  Letero al AVE-anoj
Karaj geamikoj,
oni povus diskuti longe pri la diversaj politikaj okazajhoj - mi nur mencias kelkajn koncize:

Afrin (Turkio > Kurdistano);
Sirio (fina venko de Assad antauvidebla dank al Rusio) - homaj vivoj tute ne valoras, ankau ne de civiluloj, char ili (Assad kaj Putin) bombas ankau lernejojn kaj malsanulejojn, parte kemie;
Chinio survoje tutmonde (nova Silkovojo) - stabileco plej gravas (Xi ighis nova dumviva reganto);
Usono pauzas - kiom longe;
reveno de la malnova milito inter Okcidento kaj Sovetio (ne - Rusio, kie sekret-servisto regas uzante siajn ss-metodojn) - almenau ne sukcesis kontrau Olimpiko;
DR Kongo - Kablia ne volas abdiki - la popolo suferas.

Mi ne scias chu malgrau tiaj kruelajhoj okazas tutmonda pozitiva progreso (statistike) ? La konsilio okazos en Antverpeno, Elzenveld-Seminariejo (vidu sube, la ret-ligon).

Tio signifas ke jes - ni povus havi informstandon - sed nur je Sabato, 19a de Majo.
Mi scias, ke en kelkaj lokoj/regionoj okazas pozitiva evoluigho - Uvira, Kalima, kaj multaj aliaj.

Pri la klimato - glacheroj kaj mara glacio degeladas - pli ni vidos en la norda somero.

AVE atendas anoncon de homo kiu povas kaj pretas (ghis nun senpage) daurigi la organizan vivon de AVE - por pruvi kontrau la Verdaj Partioj, ke Esperanto taugas ankau en la sfero de politiko kiel internacia komunikada lingvo.

Finfine: AVE ankorau atendas kelkajn kotizo-pagojn (mi dankas al du, ech grandaj).

Mi esperas decidon de fonduso subteni la chi-foje tre grandan akvo-projekton Kalima - se jes, ni kolektos denove ankau inter niaj samideanoj - mi informos vin.

Se vi povus pagi vian kotizon (5+X euro) estus bone - parte por agadi, parte por niaj projektoj:

- Mazingira, pluvakvo baseno kaj gastigejo por lernantinoj
- Kalima, cherpo el montara rivereto
- Uvira - rearbarigo kaj pli efikaj kuirfornoj - 2018 jam financita, dank al Agenda-21 en Freiburg.

Nia UEA-konto: avex-z
Se vi metas rimarkon al via krom-pago: Mazingira = internato, Kalima = akvo.

Koran dankon, manfred
---

2018-05-09/13  Gresiljono - Vegana-esperantista renkontiĝo
Okazas renkontiĝo de veganoj kaj pri veganismo en Greziljono ĉi jare, de la 9a ĝ 13a de Majo
Retligilo: http://gresillon.org/reve

Komento AVE/mw: Bona okazajho lerni kiel eblas kuiri kaj manghi sen bestaj produktoj.
Homoj de biologia vidpunkto povas manghi pli-au-malpli chion.
Tamen indas pripensi pri la etiko sur kiu ni bazighas nian vivon.
Chasi bestojn (ekz-e en la arktiko) char ne estas alia maniero vivi apartenas al la filozofio de la vivo: unu manghas la alia lau neceso (nutrada piramido).
Teni brut-bestojn en lau-eble afabla maniero kie ne eblas kulturi amase legomojn kaj grenojn kaj uzi iliajn produktojn apartenas al la homa kulturo de jarmiloj.
Teni bestojn en malliberejo por poste manghi iliajn produktojn au ilin mem amase certe estas mal-etika.
Vegetaranoj uzas mezan vojon, tamen kun konsekvenco ke brut-bestoj estas mortigataj lau ekonomia vidpunkto kaj uzataj (por manghi, por ledo, plumojn por havi varman liton).
Veganoj klopodas eviti tian malliberigon kaj amasan buchadon, rezignas pri la facila nutrado kaj despli devas trovi taugajn rimedojn por vivi sane.
Tamen ech veganoj trovighas en la limoj de konkurenco de vivantajhoj. Se ni uzas tre multe da palm-oleo, ni reduktas la vivo-spacon por simioj kaj aliaj arbaraj bestoj. Niaj kampoj estas baritaj kontrau la veganaj bestoj (bov-similaj, chevaloj, elefantoj,…).
Niaj stratoj, konstruajhoj nia tekniko (ventoradoj, bar-lagoj …) ghenas aliajn bestojn.
--

2018-07-28… Lisbono, Portugalo: Publika kunveno de AVE enkadre de la UK

Mi proponas almenau la jenajn temojn:
- Per-Esperanto-Agado – kion ni kune kun la surlokaj samideanoj atingis, kaj kio necesus estonte.
- Elekto de nova sekretario (afergvidanto).
---

2018-08-05/12   Kragujevac, Serbio: AVE en kunsido de la ekologia frakcio de SAT
Jen la inform-retejo: http://satesperanto.org/spip.php?rubrique631
Jen sufiche mond-vasta ekologia raporto pri la kunsido de la ekologia frakcio de SAT, al kiu apartenas AVE:
http://satesperanto.org/spip.php?article3948